



Protokolo de la Estrar-kunsido de ELI, 11-a de Marto 2019

Ĉeestantoj: Amri Wandel, Jehoŝua Tilleman, Mikaelo Lineckij, Ŝlomo Ŝaĥar, Matilda Landaŭ, Eran Vodevoz, Gabi Zeevi. Gasto: Amos Ŝapira

Protokolo de la pasinta kunsido (4-a de Februaro 2019) – publikigota en la retejo.

http://esperanto.org.il/dosi_eroj/ELI_EP201902.pdf

1. Sciigoj

a) Sukcese estis elsendita la raportaĵo pri Esperanto en Israelo en kanalo 11, ankaŭ metita rete. <https://www.youtube.com/watch?v=f0VemkYxVt0&vl=eo> Amri reklamis ĝin tra la E-mondo, venis multaj laŭdoj.

b) La Jerusalema grupo NE kunvenis en februaro pro manko de partoprenantoj, tamen okazis E-leciono al unu alveninto, kaj Laurin pagis 150 NIS por la salono. *Repagenda al li!*

c) Amri peris por Zachi Shiff restadon ĉe Oomoto en aŭgusto por filmi. Ili entuziasme akceptis.

ĉ) Jehoŝua sabate sukcese prelegis pri E-o ĉe la societo “Servas” en vilaĝo Yuvalim. Ĉeestis ĉ. 50 personoj dum la unuhora prelego, poste sekvis demandoj dum duonhoro. Ili aŭskultis kun granda intereso!

2. Dratverejo (Jehoŝua, Amos)

a) La ĉekoj de la luantoj revenis (השבון מעוקל = limigita konto)

b) La luantoj ne respondas al telefonoj, kaj ne malfermas la pordon, kvankam Amos veturis tien ĉ. 3-4 foje.

c) Amri konsultis kun adv. Modan kiu rekomendis enkasigi la garantian ĉekon (je kies nomo? – ĝi estas el la sama konto!) kaj paralele peti ordonon de la Ekzekuta Instanco por elpeli ilin (צו פינוי מההוצאה לפועל).

ĉ) Adv. Modan proponas ankaŭ sugestoj al la filino de la antaŭaj luantoj peti la elektrokompagnon fermi la elektran kurenton, ĉar ili ne plu loĝas tie (ili havas la rajton).

d) Devas peti de la doma administranto (Avram, ĉefo de la domkomitato) minaci ilin kaj per la malkonekto de la kurento, kaj per la jura elpelo.

e) Kio estos pri la pago de “arnona” (ELI pagis ĝis 31.12)? – eble ĝi estos nia perdo.

Ĝisdatigo: Amos vizitis la apartamenton. Ili malfermis. Ŝlomo parolis kun li telefone. La luanto diris ke li pagos kiam li havos monon. Ŝlomo dubas.

3. Oficejo (Amri)

a) WE (salono 35 m², du oficejoj de 6+7 m² nete): Amri kaj adv. Modan renkontiĝis kun la vendisto la 11.2-an. Post negoco li kompromisis de originala 23,000 NIS por m², ĉ. 23 m² (sume 530 mil sikloj nete) - al 19,000 NIS, t.e. 440 mil NIS nete, entute 540 miloj kun VAT kaj impostoj. Tio signifas, ke 140 miloj mankas. Sed – ni NE devas peti hipotekon, nek bezonas personon por banka garantio, ĉar la vendisto pretas ricevi la diferencon en monataj pagoj ĝis 80 mil sikloj, t.e. 5000 aŭ 3000 monate, laŭ niaj eblecoj!

2/...



Tio signifas, ke la vendisto pretas prunti al ni la diferencon, repagotan laŭ nia enspezo de la luado.

Ĝisdatigo: la vendisto venis unu el la du ĉambroj. Promesis ke enmetos en la kontrakton la horojn de la ELI-kunvenoj, por proponis vendi al ELI unu oficejon por pli alta prezo por kvadratmetro, Amri negocas pri pli malalta prezo.

b) Adv. Modan trovis eblecon por ricevi la VAT – se aĉetos iu kompanio de ELI, eblos estonte forpreni la VAT de la lupagoj.

c) Ni daŭre tenas la eblecon ĉe Recital (salono 25 m², oficejo 7.5 m²), sed adv. Modan ne favoras. Por tio ni *jam havas la sumon*, sed la kondiĉoj estas malpli bonaj, la risko pli granda, kaj ili estas malpli spertaj en tiu tereno.

4. **Financoj** (Ŝlomo)

a) Propono: Ŝlomo povu vendi PKM laŭnecese, sen peto al la Estraro. Tiel li ne bezonos vendi multe kaj anticipe por estontaj elspezoj. – *Aprobite unuanime!*

b) Kio pri la ĉekoj de la ceteraj kursanoj kolektitaj de Joela? Kiom de ili efektive pagis? Estas 12 kursanoj, ili pagas po 400 NIS. Dum la kunsido Joela donas al Shlomo la enspezojn de la vendoj kaj por la

c) Repag-peto de Doron/Enrika (taksio al la televida intervjuo): Ŝi elspezis 192 siklojn, ricevis jam 50 (ne de ni), ni povos doni al ŝi la diferencon, 142 NIS, por la IK eventoj.

ĉ) Por la estonto (propono de Jehoŝua): Estu 3 personoj, ia ajn duopo de ili rajtos aprobi telefone tiaspecajn repag-petojn. Ilia plenumo NE estas garantiata aŭtomate!

Decido: la tri homoj rajtigitaj por tio estas: Amri, Jehoŝua, Ŝlomo. *Aprobite unuanime!*

d) Ŝlomo anoncas: li devos veturi al studtago de la Registristo en majo. *Decido*: liaj elspezoj (vojaĝkosto) repagendas. *Aprobite unuanime!*

5. **Israela E-isto** (Mikaelo, Amri)

a) Amri demandis ĉe la presejo pri la kovertoj. Ĉu printi 500 ekz. aŭ 1000? (La IE bezonas ĉ. 250). *Decido*: mil!

b) Kia dezajno? (Amri sendos rete kelkajn eblecojn)

c) Jehoŝua preskaŭ finis ĝisdatigi la eksterlandajn adresojn.

ĉ) Mikaelo: ĉu IE (printempa eldono 2019) pretos ĝis la IK? – 95% estas preta, mankas pri Amos Oz de Amri. La provlegado estos de Gabi kaj de Andreo Peĉonkin el Rusio.

6. **IK-20 Eilat+Akaba** (Amri)

a) Amri ĝisdatigis la mendojn de la ĉambroj por la 1a PK - ekskurso en Masada kaj Jerusalemo. kaj mendis en Tel Aviv (20-21.3), mendos en Jordanio (14-17). Li skribis al la hotelo en Akaba pri prelegejo kaj ĉambroj, sed ne venis respondo ĝis nun.

b) Jehoŝua mendis ĉe Port Inn por la 2-a PK laŭ datumoj pri la mendoj donitaj de Amri.

3/...



- c) Aliĝintoj ĝis nun: 45 personoj, el ili 22 eksterlandanoj.
(Akaba: 24, PK Petra: 16, PK 18-21.4: 15, PK 22-24.4: 8).
- ĉ) Programo: 1) Ekskursa: vendrede al Parko Timna, sabate piede al la Monto Cfaĥot, kaj Subakva Spektejo. 2) Vespera: artistoj - ĵaude Kajto, vendrede Kajto kaj Jomo, sabate Jomo. Baldaŭ aperigota en la retejo. Tali kaj Franz (eŭritmio), Enrika. 3) Kleriga: prelegoj de Sean (Zamenhof, Ben Yehuda kaj Douglas Hyde: 3 homoj, 3 lingvoj), Amri (La lunvojaĝo de Bereŝit), Renato (paco en la Mezoriento), Anna (Ĉu la komencantoj gravas?), Tali (eŭritmia laborgrupo)
- d) Dua bulteno aperos kun detaloj pri la hotelo (vilaoj de du dormoĉambroj kun komuna banejo en Club Inn), programo, transportado (nova flughaveno Ramon, 30 km norde de la kongresejo).
- Rimarko:* interkonsente kun Renato Corsetti, la MONA-kunveno en Akaba okazos nur 14-15.4, post la IK en Eilat.

7. UEA kotizŝanĝo (Jehoŝua)

- a) Jehoŝua telefonis al antaŭaj IM-oj. El ĉ. 65 IM-oj (plej multe en la kategorio MG, DM) ĝis nun remembriĝis nur 3.
- b) Ĝis la fino de marto Jehoŝua verkos la protestan leteron al la Komitato kun la rezulto por la israela IM-aro.
- c) Jehoshua telefonos (ĝis la aprila kunsido) al Martin Shaffer por demandi pri:
- 1) La propono de Mark Fettes, por la transira jaro meti Israelon en la 4-a kategorio,
 - 2) Pri la propono de Martin, farita buŝe al Amri en januaro, duon-“kanutigi” (pagi 50% de la baza kotizo) ĉ. 5 israelajn s-anojn (ĉu delegitojn?)

8. E-kurso en Tel-Avivo - daŭras sukcesplene. Sed - kiom restas? Amri: 12 gelernantoj. Mikaelo (por la venonto): En la venontaj anoncoj aldoni linion, ke eblas lerni E-on ankaŭ speciale por rus-lingvanoj.

9. Jerusalema Libro-Foiro 2019 (Amri)

Daŭre ne estas precizaj datoj (en junio) en la retejo estas erara telefon-n-ro.

10. Planado de Landaj Kunvenoj (denove prokrastita)

Proponoj/kritikoj de Doron/Miĥal

La venonta kunsido: 4-a de Aprilo 2019, 19:30

Protokolis: Gabi Zeevi